# *Avancas preparlaboroj por la pintkunsido de la Asocio de Karibaj ?tatoj.*




La vicministro pri eksteraj rilatoj de Kubo, Abelardo Moreno, asertis en Havano ke oni avancis du trione en la preparo de la Deklaro de Havano kun tre bona spirito.

Kiel preparo por la pintkunsido de la Asocio de Karibaj ?tatoj,  Moreno esprimis ke la sesioj de altrangaj funkciuloj finpreparas la dokumentojn traktotajn de la ?tatestroj kiuj jam alvenis al Kubo por partopreni la kunsidon.

Li aldonis ke ekzistas rekta ligo inter la decidoj nuntempe alprenitaj kaj tiuj interkonsentitaj de la pintkunsido de la Komunumo de Latinamerikaj kaj Karibaj ?tatoj (CELAC) okazinta en Havano la pasintan januaron.

La pintkunsido de la asocio de karibaj ?tatoj estos ta?ga spaco por pritrakti kelkajn el la komunaj defioj alfrontataj nuntempe de la karibaj landoj.

La? la plano partoprenos la pinkunsidon ?i-semajnofino en Havano entute 16 prezidentoj plus ministroj kaj aliaj altrangaj funkciuloj.

Dum la kunsido oni intertraktos Agadplanon aneksan al la Deklaro de Havano favore al da?ripova evoluo de la regiono kaj aliaj cele al plifortigo de la rilatoj kaj kunlaboro en diversaj sferoj sociekonomiaj kaj kulturaj de la kariba regiono.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/95554-avancas-preparlaboroj-por-la-pintkunsido-de-la-asocio-de-karibaj-statoj

**Radio Habana Cuba**